

Kultura Centro Esperantista eniras novan labor-fazon, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 561, 1974.07.10 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nuntempe Kultura Centro Esperantista dissendas nacilingvajn informilojn por vastskale informadi pri la efektivigita laboro kaj pri diskonigindaj projektoj. Inter tiuj projektoj, kies efektivigado estas baldaŭa, ni raportu pri la starigo de **Internacia Feria Altlernejo**.

A.- Jen kion tiurilate diras la laborprogramo de Kultura Centro Esperantsita :

Cl.-Kultura Centro Esperantista celadas al la okazigo de **feriaj** kursoj pri kaj per Esperanto. Kultura Centro Esperantista konsideras tiujn kursojn kiel provandon al la iompostioma organizado de kursoj havantaj pli gravan kulturalan signifon, tio estas al la funkciigo de Internacia Feria Altlernejo. Jen la kursoj, kiuj devus troviĝi en la instruplano de tiu Internacia Feria Altlernejo :

A.- Kursoj pri Esperanto kaj ties historio, kiuj kondukos al la akiro de la ĉisekvaj diplomoj : elementa diplomo ; meza diplomo ; supera diplomo.

Cl.- Kursoj pri la historio kaj literaturo de Esperanto.

A.- Kursoj pri lingvistiko kaj interlingvistiko.

Cl.- Kursoj pri la instruado de Esperanto, kiuj kondukos al la akiro de pedagogia diplomo.

A.- Kursoj en Esperanto pri la internacia vivo socia, jura kaj scienca kaj pri la temo interpopola konduto.

Cl.- Kursoj en Esperanto pri plej diversaj fakoj, tio laŭ tutmonda vidpunkto.

A.- En tiu celo starigi Internacian Ferian Altlernejon, Kultura Centro Esperantista kunlaboras kun la samcelaj kunlaboremaj organizaĵoj. Kontrakto difinas tiun kunlaboron. (Fino de la citaĵo).

Cl.- Ekzemple Kultura Centro Esperantista kunlaboras kun SUK, tio estas la Someraj Universitataj Kursoj, kiuj disvolviĝas en la Universitato de Lieĝo.

A.- La laborprogramo de Kultura Centro Esperantista ankaŭ detale antaŭvidas la teknikajn kaj financajn problemojn, kiujn oni devos unue solvi antaŭ ol povos senriske funkcii la dezirata Internacia Feria Alternejo. Ni ne volas tedi vin kun tiuj problemoj.

Cl.- Ni tamen diros, ke la urbo La Chaux-de-Fonds, kiu esperas gastigi tiun Internacian Ferian Altlernejon promesis meti al ĝia dispono la necesajn instruejojn en konvena lernejo.

A.- La ĉefa solvota problemo troviĝas flanke de la esperantistaro. Esperantio ne posedas sufiĉe vastan klerularon, el kiu estas eble alvoki kapablajn profesorojn por gvidi la deziratajn kursojn. Ĉefe por la meza kaj supera esperanto-kursoj mankas la kompetenta instruistaro kaj la instru-materialo. Tio signifas, ke tiuj kursoj povos esti nur iom post iom organizataj, tio paralele al la formado de la instruistaro kaj paralele al la verkado de la lernolibroj. Tiu

formado kaj redaktado ne estas eta afero. Al ĝia solvado energie laboradas Kultura Centro Esperantista ekde sia fondiĝo en 1968, kaj la rezultoj ankoraŭ estas magraj. Sed la situacio ne estas senespera. Tre verŝajne jam la venontan jaron kompleta kurssesio kun elementa, meza kaj supera gradoj povos disvolviĝi.

Cl.- Ni estas devigataj konstati, ke la organizaĵoj, kiuj ĝis nun malfermis esperanto-kursojn plejofte limiĝis al la gvidado de tre elementaj kursoj. La rezulto estas, ke ĝis nun la UEA-superan ekzamenon nur malmultaj kandidatoj trapasis. La naciaj superaj ekzamenoj de Esperanto estas ĝenerale malaltnivelaj, ĉar inter la ekzamenantoj malmultas la vere kompetentaj esperantistoj.

A.- Kultura Centro Esperantista celados por superaj kursoj la nivelon, kiun fiksas UEA. Kandidatoj al superaj kursoj devos sukcesi eniran teston, kiun proponos la koncerna profesoro. Malsukcesintoj havos la eblecon kompletigi siajn lingvajn konojn sekvante progresigan kurson.

Cl.- Jam nun ni povas anonci la unuan fakan kurson de Internacia Feria Altlernejo. Ĝi disvolviĝos en La Chaux-de-Fonds de la 13-a ĝis la 26-a de julio 1975 sub la gvidado de sinjoro Claude Piron, tradukisto por Mond-Organizaĵo pri Sano kaj instruŝarĝito ĉe la Universitato de Ĝenevo en la instituto **Ecole de Psychologie et des Sciences de l'Education**. La temo de la kurso estos : **Traduko al kaj el esperanto. teorio kaj praktiko**. Nur 12 kursanoj estos akceptitaj. Do se simila kurso vin interesas, tuj skribu por ricevi konvenan informilon.

A.- Samtempe disvolviĝos elementa kaj progresiga kursoj. Kaj la gepatroj sciu, ke Kultura Centro Esperantista intencas paralele organizi kurssesiojn por la infanoj kaj geknaboj. Matene ili lernos Esperanton kaj faros manlaborojn. Postagmeze ili migrados en la montaro Ĵuraso, foje solaj kun la edukistoj, foje kun la plenkreskuloj. Belaj ferioj, ĉu ne !

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!